




# ORIENTA STELO

March/marto 2013



Orienta Esperantista Federacio  
Originale fondita en aprilo 1932

Eastern Esperanto Federation  
Originally founded in April 1932

## Kontaktdetaloj

Roy Threadgold  
Ben Gosling  
Barrie Murphy  
Mark Drake

Prezidanto 01371850481  
Sekretario 01787247737  
Kasisto 01702472193  
Komitatano 02085188094

[roy@boydellsdairy.co.uk](mailto:roy@boydellsdairy.co.uk)  
[benjamin.gosling@btinternet.com](mailto:benjamin.gosling@btinternet.com)  
[celiaandbarrie@tiscali.co.uk](mailto:celiaandbarrie@tiscali.co.uk)  
[marko.drejko@gmail.com](mailto:marko.drejko@gmail.com)

*Tiuj kiuj ricevas OS rete, ricevas ĝin pli frue, kaj samtempe la Federacio ŝparas la poŝtkoston. Ĉiuj gajnas! Nur bezoniĝas informi al Roy T. pri via retadreso.*

## Sukcesa kunveno en kampara dometo



Nia oktobra kunveno okazis en eble la plej luksa kunvenejo iam. Layer Marney Tower estas ne facile atingebla loko, sed deko da anoj sukcesis trafi ĝin tiun grizan, pluvan sabaton fine de oktobro. Por malhelpi la okazon, niaj kutimaj malamikoj ĉe Railtrack konspiris fermi la fervojon inter Shenfield kaj Witham. Tamen, ili ne venkis niajn bone oleitajn sistemojn, kaj ĉiuj alvenis bonorde.

La bonkoraj posedantoj, Ges-roj. Charrington disponebligis bonan kunsidĉambron – la “Mapĉambro” kiu perfekte taŭgis al ni kaj ankaŭ kuirejton por prepari la trinkaĵojn. Eĉ pli bone, ili insistis ke ni ne pagu la luprezon. (Eble helpis ke la patrino de S-ino. Charrington lernis esperanton antaŭ multaj jaroj.)

Vere ĝinde estis nin trovi en tia interesa kaj etosoplana konstruaĵo. Antaŭ la lunĉoro ni spitis la pluvon por viziti la apudan preĝejon kie la pastrino klarigis iom pri ĝia historio.

Posttagmeze, Ben parolis pri la historio de la ‘Tower’ mem, inkluzive pri ĝiaj diversaj fantomoj, kiuj bedaŭrinde ne degnis kunigi kun ni.



Roy rakontis, uzantaj tre interesajn fotojn, pri sia dumknaba travivaĵo kiel viktimo de la granda inundo de 1953 ĉe sia hejmo en la Tamiza estuaro; pri sia vivo post la evento, kaj kiel ĝi rezultis en agrabla restado en Svislando inter bonkoruloj. Ni strebis traduki reklamflugfoliojn pri la historio de la turo, kaj pli malpli eĉ sukcesis. Estis multaj vortproblemoj (ekz. kiel traduki “Glamping”), sed ni esperas montri ekzempleron dum la jarkunveno.

Antaŭ ol ekreiri hejmen ni aŭskultis humurajn rakontojn per sonbendoj.

## Prezidantaj notoj

Iom post iom nia membraro ŝrumpiĝas, velkiĝas. Pliiĝi kaj morto forprenas niajn anojn sed preskaŭ neniu anstataŭigas ilin. La morto de Michael Murphy kaj Charles Newman estis serioza perdo kaj al la southenda grupo kaj al la federacio. Niaj lokaj grupoj iĝas grupetoj kaj renkontiĝoj iĝas pli kaj pli malfacile aranĝataj. La problemo ne ekzistas unike en nia federacio, sed ĉu ni ne devus strebi renversigi la forfalon? Aŭ ĉu ni devus simple akcepti nian neeviteblan malaperon? Kion vi opinias?

Mi ĵus revenis hejmen post tago en lernejo en Tonbridge. Tie, enkadre de “lingva konferenco”, mi eksplikis pri la lingvo al 60 - 70 studentinoj sed nur du el ili estis jam aŭdinte pri Esperanto. Ili multe ĝuis la okazon kaj entuziasme ricevis la informon. Ĉiu grupeto pasigis nur 10-15 minutojn kun mi, sed ili miris pri tiom kiom ili lernis. Ŝajnas al mi ke lernejoj povus esti riĉa fonto de komencantoj se nur ni povus ĉerpi ilin.

La apudan tablon estris virino kiu reklamadis la luksemburgan. Eble tiu estis eĉ pli malfacila tasko ol la mia!

Fine, ne maltrafu nian jarkunvenon (vidu sube). Ni ĉiam ĝojas vidi novajn vizaĝojn (kaj la antikvajn!).

### Annual Meeting

Saturday 23<sup>rd</sup> March  
St Michael's Church House  
Braintree  
11 am – 5 pm

Bring your own lunch; drinks provided.

Day Money £3

All welcome, regardless of linguistic ability.

### Jarkunveno

Braintree, St Michael's Church House  
Sabato la 10a de marto

1100 ĝis 1700

Kunportu propran manĝaĵon; trinkaĵo provizota.

Tagmono £3

Ĉiuj bonvenaj, el kiu ajn lingvo-nivelo.

Biciklo por virinoj..



kiam vi falos..



Biciklo por viroj..



kiam vi falos..



## Brita Kongreso

De la 10-a ĝis la 12-a de majo en Ramsgate okazos la Brita Kongreso. Kutime estas nur unu, du ĉeestantoj el nia federaciano, sed ĉi jare, pro la proksimeco de la kongresurbo oni rajtas atendi pliajn. Elserĉu la detalojn rete ĉe <http://www.britakongreso.org/>

Eblas pasigi nur unu tagon tie se vi ne disponas la tutan semajnfino kaj vi certe trovos interesplenan programon kaj babiladon. Oni atendas pli da eŭropaj vizitantoj ol kutime pro la simpleco trafi pramŝipon, tiel oni devus sperti vere internacian etoson.

